

Claude Gacond

154-a radioprelego ; 1966.09.14 & 1966.09.17.

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtundan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

Cl.- La pakto de 1291, pri kiu ni jam parolis, starigis nenian aŭtoritaton kaj nenian komunan politikon, krom la malpreciza promeso pri reciproka kunhelpo. Ĝis la fino de la dekoka jarcento la Svisa Ligo posedis kiel komunan institucion nur Dieton, tio estas kunveno de ambasadoroj, kiu ne havis fiksan kunsidlokon kaj nenion povis decidi pro la malfido, kiu regadis inter ĝiaj kunsidantoj.

A.- La Svisa Ligo formis certe tuton malpli potencon, ol la sumo de la individuaj ŝtataj potencoj, kiu ĝin konsistigis. Tio precize spegulas mankon de vera federo.

Cl.- Kiam la francaj armeoj venis invadi Svislandon post la franca revolucio, la Svisa Ligo ne povis kontraŭmeti propran armeon. Ĉiu kanton, unu post la alia, estis subpremita kaj rabita. Du el ili estis proklamitaj francaj departementoj kaj la ceteraj estis perforte unuigitaj.

A.- Estas en tiu epoko, ke Henrich Pestalozzi famiĝis kreante hejmon por centoj da georfoj, viktimoj de la bruligo de Stans.

Cl.- Ni rigardu la tiaman Svislandon, kiu pereis sub la battoj de la francaj armeoj.

A.- La Svisa Ligo estis formita de dektri suverenaj ŝtatoj pli aŭ malpli potencaj. La urbo Zug estis etega, dum la Berna Potenco estis vere interna danĝero. La etuloj havis la kutimon koalicii por rebati la regemon de la granduloj. Estis eterne ŝanĝiĝanta ekvilibro, iomete kiel en la eŭropa historio.

Cl.- Inter la urbo kaj kamparoj regis malfido. Sed tiu divido inter du viv-kutimoj ne estis la sola disput-kaŭzo.

A.- Dum kantonoj restis fidelaj al la katolika fido, aliaj fariĝis netoleremaj protestantoj. La kanto Appenzell eĉ disiĝis en du duonkantonoj : unu por la katolikoj, unu por la protestantoj. Dum tri jarcentoj okazis religiaj interkantona militoj. La konflikto Sonderbund okazinta en 1847 estis la lasta ebla religia milito. Poste la federacia sistemo ĉesigis tiujn kverelojn.

Cl.- Tiuj dektri ŝtatoj estis tre fieraj kaj tiklaj pri sia absoluta sendependeco kaj suvereneco. Tamen ili ne hezitis fari al la aliaj tion, kion ili ne estus volontaj travivi. Ili sin ĵetis sur la najbarajn teritoriojn por ilin submeti. Tiĉino, Aargau, Thurgau kaj Vaud sciis, kion signifas longdaŭra kolonia reĝimo.

A.- Ĉirkaŭ la Svisa Ligo ekzistis ŝtatoj, kiuj deziris eniri la Ligon. Ili kandidatiĝis. Sed neniam en la Dieto la ambasadoroj de la ligaj ŝtatoj povis akordiĝi por akcepti tiujn kandidatojn. La eniremoj fariĝis nur amikoj de la Svisa Ligo.

Cl.- Por pliigi sian politikan premadon la svisaj ŝtatoj ne hezitis peti la helpon de eksteraj potencoj, kiel Britio, Francio, Aŭstrio kaj eĉ Rusio. La kantonoj, kiuj sentis sin minacataj, tiam siavice petis la protekton de la malamiko de la eksteraj alvokitaj potencoj.

A.- Sed kiam ekstera potenco alvokita volis interveni en la svisan politikan vivon, tuj ĉiuj svisaj ŝtatoj forgesis siajn kverelojn por kontraŭstari tiun interveneman potencon, eĉ la vokinta kanto. Tiu stranga sinteno plurfoje mirigis kaj embarasis reĝojn kaj imperiestrojn.

Cl.- Tiu reflekso kontraŭ la eksteraj intervenoj en la komplikita svisan politikon naskis la emon al neŭtraleco. Tiuj eterne kverelantaj svisoj ĉiam ĉesis siajn kverelojn dum eŭropaj internaciaj konfliktoj. Antaŭ kaj post la tridekjara milito la svisoj ekzemple interbataladis pro

religiaj kaŭzoj, sed dum tiu religia tridekjara milito okazis en Svislando subita mirakla religia repaciĝo.

A.- Oni preskaŭ povas aserti, ke Svislando ekzistis, nur kiam ekstera danĝero minacis la sendependecon de ĝiaj kantonoj. Tiu reflekso pri neŭtraleco dum eŭropaj internaciaj konfliktoj influis la teritoriojn, kiuj formas proksimume la hodiaŭan Svislandon.

Cl.- Svislando estis pli sento kaj ideo, ol realaĵo. Du ekzemploj provos komprenigi tion. Kiam Jean-Jacques Rousseau, post longa restado en la franca regno, revenis en Svislandon, li agis strange. Enirante la bernan teritorion li haltigis sian veturilon kaj elirante li kisis la teron kaj ekkriis : « *Ĉielo, protektanto de la virto, mi laŭdas vin, mi tuŝas teron de liberecoj !* »

A.- Samtempulo kaj malamiko de Rousseau, Voltaire, loĝis apud la ĝeneva limo en la vilaĝo Ferney. Li emis subskribi : « *La sviso Voltaire* » kvankam li nek vivis en Svislando, nek estis sviso.

Cl.- En tiu epoko Svislando ne estis tero multe pli liberema, ol la ceteraj eŭropaj landoj. Sed ekzistis mito pri Svislando, mito, kiun simbolas la legendo de Wilhelm Tell.

A.- Iom post iom la svisoj identiĝis al tiu mito kaj faris de sia lando regnon de libereco. Sed dum la dekoka jarcento la sviseco ne ankoraŭ konkretiĝis en vivanta realaĵo. Ĝi vivis nur en la kapoj de idealistoj. Ĝi esprimis deziratan realecon.

Cl.- Svislando en la dekoka jarcento estas komparebla al Eŭropo nuntempe. Ĝi ludis la rolon de ento. Oni povis pridubi ĝiajn ekzaktajn limojn kaj ĝian politikan koheron, sed ĝian spiritan radiadon oni ne povis pridubi. La fremduloj ne trompiĝis. Ili rimarkis ĝian ekziston, kvankam ĝiaj popoloj preferis reliefigi siajn diferencojn.

A.- Sed subite la svisoj ne plu povis kontentiĝi pri nura sviseco. Tiam ili fondis sian federacion. Pro tio multaj svisoj decidis, ke Svislando naskiĝis nur en 1848, kiam okazis tiu metamorfozo.

Cl.- Multaj svisoj opinias, ke la samo iom post iom okazos por Eŭropo. Kiam la eŭropanoj malkovros sian komunan econ, tiam ili havos nur unu deziron, ĝin reale esprimi en realaĵon. Tiam certe naskiĝos eŭropa federacio.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon !

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !